

67:1: 4

INTERNACIA

JURA

REVVUO



B·U·D·A·P·E·S·T

2/27/57, 100/101

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ /IEAJ/
/aliĝinta faka organizo de UEA/

estas fondita en 1957, dum 42a Universala Kongreso de Esperanto, en Marseille /Francujo/.

El la decidoj de la fondkunveno:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro,

2. aliĝi la Asocion se eble kiel sektion, al "International Law Association" kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj.

La celo de IEAJ estas: a./ disvastigi la Internacian Lingven inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;

b./ helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

Ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomigis ĉe Jura Fakultato, aŭ samranga Alta Lernejo kaj kiu parolas la Internacian Lingven. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. - Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion.

Aliĝojn akceptas Sekretarioj-kasistoj je la subaj adresoj.

Kotizo estas 1 usona dolaro aŭ egalvaloro jare.

Organo fondita en 1966, dum 51a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto /Hungarujo/, de la Asocio estas "INTERNACIA JURA REVUO".

Abonprezo por membroj 1 usona dolaro kaj por nemembroj 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Plenumkomitato por la laborjaro 1966-1969:

Prezidanto: Prof. Dr. Ivo Lapenna decento pri Kompara Seveta kaj

Orienteŭropa Juro en The London School of Economics
and Political Science, Universitato de London /Britujo/

Vicprezidantoj: Roman Sakowicz advokato, Nowa Sol /Pollando/
Erwin Stolpe juĝisto, Berlin /Okc.Germanujo/

Sekretarioj-kasistoj: D-ro Ludwig Röhl notario
Friedrich-ven-Teck-Str 3. Höchstädt/Donau /Okc.Germanujo/

D-ro Lajos Márton sekretario de Hungara Juristo-Asocio
Szemere u. 10. Budapeŝto V. /Hungarujo/

INTERNACIA JURA REVUO

organo de la Internacia Esperante-Asocio de Juristoj

II-a Jare - N-ro 1.

Januaro-Marto 1967

ENHAVO

		Paĝo
HUNGARA JURO DE HEREDO:	Dro Lajos Márton /Hungarujo/	2
LA PROGRAMO DE UN PRI LARĜA KONIGO DE SIGNIFO DE LA INTERNACIA JURO.		8
LA POZICIO DE ADVOKATO EN NORVEGUJO:	Ten Arbe Hoeg /Norvegujo/	11
LA POZICIO DE ADVOKATO EN DANLANDO:	Terje Møllerup /Danlando/	13
LA POZICIO DE ADVOKATO EN GERMANUJO:	Dro W.Herrmann /Okc.Germanujo/	15
PRI JURO EN SKANDINAVIO:	Eskil Svano /Danlando/	18
FORUMO: LA PLEJ GRANDA HONORARIO:	Roman Sakowicz /Pollando/	21
LIBROBRETO: "LA SOCIALISMA JURO" Ak.I.SZABÓ: -m.l.-		2

Redaktoro:

Dro Lajos Márton

B u d a p e s t.

HUNGARA JURO DE HEREDO

Artikolo 8. en la Konstitucio de Hungara Popolrespubliko garantias la rajton pri heredo. La jure de heredo enhavas tiujn jurajn regulojn, kiuj reglementas la heredon de havaĵo de la mortinto, per alia persono. La jure de heredo protektas la personan proprietaĵon de la civitanoj. La jurajn regulojn de heredo enhavas la Kvina Parte de Civila Kodo, Leĝo No IV. de jaro 1960.

I.

Ĝeneralaĵ reguloj de prihereda jure

"Per merito de la homo, sia heredaĵo, kiel tuto kcernas la heredanton" /§ 598./ El tio rezultas, ke ankaŭ la heredo estas posedo de rajtoj de la antaŭulo. Rezultas el la dispozo de jura regulo, ke ankaŭ la heredo estas hereditado de la rajtoj, sed ties speciala speco.

La heredo estas posedo de rajto de la antaŭulo. Do, al tio, ke la posedon de rajto, oni povas kvalifiki, devas esti t e s t a m e n t i n t e, - h e r e d i t o r e - /kies heredaĵo transiras post sia morto/, h e r e d a ĵ o k a j h e r e d u l e /al kiu transpasas la heredaĵo/. Se la heredaĵo, ne kiel tuto transpasas al posedo de alia persono, tiam ni parolas pri d e s t i n a ĵ o . Sed heredule estas nur tiu persono, kiu heredas la heredaĵon, kiel tuten. Ĉu la herede, ĉu la destinaĵo signifas kontingenton el la havaĵo de la testamentinto. Sed inter ili laŭjure estas akra diferenco, malgraŭ tio, ke en la ĉiutaga lingvo ne aperas tiel akre.

La heredo, nome kiel tuto -aktivoj kaj pasivoj- de la heredaĵo transpasas al la posedo de heredanto. Se ekzistas pluraj heredantoj, tiukaze nur certa kvoto de la heredaĵo transiras al ĉiu.

Heredi oni povas nur surbaze de leĝo aŭ de testamento. Ĉar la heredaĵo povas esti nur havaĵa valore estanta okaze de morto de la testamentinto, de ĝenerale la heredaĵo koincidas kun la havaĵo de la testamentinto. La nocio de "havaĵo" en ĉiu kazo, oni devas kompreni en jura senco. Do, la havaĵo entenas ne nur la havaĵobjektojn, la rajtojn, la kreditojn, la aktivojn, sed ankaŭ la devigitecojn, la debetojn, la pasivojn. Tiel la kvanton de heredaĵo donas la saldo de aktivoj kaj pasivoj. Sed, la havaĵo de la testamentinto ne entenas tiujn havaĵkarakterajn rajtojn kaj devigitecojn, kiuj ĉesas per morto de la testamentinto. Same, la heredaĵo ne entenas tiujn havaĵobjektojn, kies posedrajton, la posteulo de la testamentinto ne laŭherede akiras. Krome ne tiuj havaĵobjektoj, kies, la testamentinto estis la antaŭheredanto, ĉar en kazo de lia morto, ĝi transiras al la postheredanto.

Heredo povas okazi nur en kazo de morto de la homo. Ne estas heredo, la transiro de havaĵo de la jura persono, okaze de ĝia ĉeso. Sed heredanto povas esti ankaŭ jura persono.

Ĉiu homo estas rajtkapabla, sed la feto ne povas esti testamentinto, nur kondiĉe. Rajtkapablecon li havas nur per vivanta naskiĝo. Same, la feto povas heredanto esti, se li vivanta naskiĝas. Do, se li ne vivanta naskiĝas, tiam li ne estas rajtkapabla kaj ne povas testamenti. Kiel estas videbla, iu ajn povas esti testamentinto, sed li ne devas havi agkapablon.

La heredaĵo transiras al la heredanto, per morto de la testamentinto. La morton oni devas per epitomo de matrikulo, aŭ per, la morton konstata, juĝaĵo.

decido legitimi. Kun la morto de la testamentinto jurvalidas la juĝeja deklaro pri lia morto.

Heredanto povas esti ankaŭ la ŝtato, eĉ manke de laŭleĝa, aŭ laŭtestamenta heredanto, monopole nur la ŝtato heredas. /§ 599./

La prihereda kapablo enhavas tien, ke iu -homo aŭ jura persone- la heredaĵen kiel heredante aŭ testamentite, de laŭ rajto de herede, povas akiri. La prihereda kapablo ne estas aparta kategorio, sed ĝi koincidas kun la ĝenerala akirkapablo de la personoj. Tiun akirkapablon havas ĉiu homo kaj jura persono, se ĝi havas rajtkapablon. Estas tute alia problemo, ke la jura regulo povas, en certa rilato, limiti la akirkapablon. Ekz.: en kazo de senmerito: a./ kiu danĝerigas la vivon de la testamentinto, b./ kiu per intenco ago malhelpas la liberan deklaren de laŭta /fina/ volo de la testamentinto, c./ kiu, per obteni la heredaĵon, danĝerigas la vivon de la prihereda rajtulo.

Laŭ la §-oj 603-605, la laŭleĝa heredanto kaj testamentinto povas fari kontrakton, en kiu la unua abdikas pri la tuto aŭ pri la parto de la heredaĵo. La testamentinto povas ekskludi sian laŭleĝan heredanton, kiun agon li, ŝi ne devas motivi /§ 637./ La malkonfeso estas ekskludo de la rajtulo pri la deviga parto. Ĝi povas okazi surbaze de porleĝaj motivoj kaj tiun agon la testamentinto devas motivi. Malkonfesaĵoj pro: aa/ senmeriteco pri heredo, bb/ krimago kontraŭ la testamentinto, cc/ krimago kontraŭ la parenco aŭ geedza partio-geedzigiĝinto de la testamentinto, dd/ grava malobservo -ofendo- de vivtena devigiteco ekzistanta al la testamentinto, ee/ senmorala vivmaniero, ff/ kendamno minimume je kvin jara prizono, gg/ specialaj malkonfesaĵoj motivoj kontraŭ la partio de geedzoj: la geedzeco brutale ofenda sinteno.

La heredante povas tute aŭ parte rifuzi la heredaĵon.

II.

Laŭleĝa herede

Se la testamentinto ne disponas pri la personoj, kiujn li, ŝi volas havigi certan parton el sia heredaĵo, tiam la leĝo ordonas pri la heredantoj. Tiu personoj estiĝas "laŭleĝaj" heredantoj. Ankaŭ la ŝtato povas esti laŭleĝa heredanto.

Laŭleĝaj heredantoj estas: a./ laŭsangaj parencoj, b./ geedzigiĝinto. Ilia hierarke: 1./ idoj, 2./ geedzigiĝinto, vivkunul/in/o. Se ne ekzistas vivkunul/in/e, tiam sekvas la parencoj de suprenira linio. Se ne ekzistas idoj, tiam la havaĵo de la testamentinto dividiĝas: a./ devenlinia havaĵo, kiun heredas la parenco de suprenira - ascenda - aŭ de flankenira - branĉa - linio, de kiu tiu ĉi havaĵo transiris al la testamentinto, b./ akirita havaĵo, kiun heredas la geedzigiĝinto, krom li, ŝi havas rajton je fruktuzado de la devenlinia havaĵo.

Se tiu ne ekzistas, tiam la ŝtato havas rajton pri la heredaĵo. Ĝia pozicio estas sama kun la ceteraj heredantoj. La devenul/in/on de la testamentinto determinas la jure de familio. Laŭ la § 35. estas indiferenta la senvalide de la geedzeco. Ĉesas la prihereda interrilato, se oni parte faligis -renversis- la konjekton de la deveno.

/Unuavice heredas la infano de la testamentinto. Se estas pluraj infanoj, tiam ilia heredaĵparto estas egala. Se lia, ŝia infano, aŭ malproksima ido ne ekzistas, en tiu kazo la geedzigiĝinto, respektive la parencoj de suprenira linio heredas:/

La adoptado kreas heredan interrilaton. La adoptado ligas la adoptiton, en

familion de la adoptanto, en sama rajta situacio, kiel estas la laŭdevena -laŭsanga- infano de la adoptante.

La herede de la geedzigo

La geedzeco igas priheredan interrilaton. Laŭ leĝa ordo de la heredado, post la idoj la geedzigo, poste ja la parencoj de suprenira linio sekvas. Se ekzistas idoj, en tiu kazo, la geedzigo heredas la rajton pri la fruktizado de la heredaĵo. Se ne ekzistas idoj, tiam la geedzigo heredas la akiritan havaĵon /dum geedzeco akiritan havaĵon/ kaj la rajton je fruktizado de la devenlinia havaĵo. La bazo de herede de la postvivanta geedzigo estas la valida geedzeco kun formertinta geedzigo. Se per disigo jam pli frue ĉesis la geedzeco, en tiu kazo nature interrompiĝis ankaŭ la prihereda interrilato.

Herede de la parencoj

Se, ne ekzistas idoj kaj geedzigo, en tiu kazo heredas 1./ la parenca suprenira linio /gepatroj, geavoj aŭ 2./ ties ido /gefratoj, gekuzoj aŭ 3./ parenco de flankenira -branĉa- linio.

Tiu parenca herede tion signifas, ke dum interne de unu grupo ekzistas heredantoj, ĝis tiam la alia grupano ne povas heredi.

Devenlinia herede

Se, ne ekzistas idoj, aŭ ili ne povas heredi, tiam la havaĵo de la testamentinto dividiĝas en du partojn: a./ laŭdevenlinia havaĵo, kies posedrajte transiris de la suprenira devenliniulo/in/e al la testamentinto /dum li, ŝia vive/, b./ dum geedzeco akirita havaĵo. La unuan havaĵparton heredas tiu devenlinio, de kiu ĝi transiris la heredanto, la duan parton ricevas, en egala proporcio, la patre kaj patrino de suprenira devenlinio.

Per oni povu konsideri la havaĵobjekton de la testamentinto kiel devenlinian, estas bezona a./ ili transiru de definitaj personoj /suprenira -ascenda- devenliniulo/in/e: gefratoj, aŭ ties idoj, b./ per herede aŭ senpage ili transiru al la heredanto.

III.

Laŭtestamenta herede

La testamento estas tiu jurafero, en kiu la testamentinto je okazo de sia morto disponas kun tiu kondiĉo, ke la havigito postvivu la testamentinton. La testamento estas unuflanka jurafero. La prihereda kontrakto kaj mortokaza donaco estas duflanka jurafero. Laŭleĝa herede nur tiam okazas, se la testamentinto ne disponis en testamento. Oni nur persone povas fari testamenton. Ne sufiĉas la rajtkapablo, sed bezonas ankaŭ la agadkapablo.

La specoj de la testamento: 1./ publika, farite antaŭ la notario aŭ antaŭ la distrikta tribunalo, 2./ privata en skribo. La formoj de la dua estas: a./ la testamentinto mem propramane skribas ĝin, b./ li, ŝi maŝinskribas, aŭ alia persono skribas kaj la testamentinto, antaŭ du atestantoj nur ĝin subskribas, aŭ sur la akto sian subskribon konfesas. En tiuj ĉi du kazoj ankaŭ la du atestantoj subskribas la testamenton, c./ la testamenton, ĉu propramane, ĉu per alia persono, skribitan li, ŝi subskribas kaj kiel ĉu malfermita, ĉu fermita akto ĉe la notario li, ŝi deponas sciigante, ke ĝi enhavas lian testamenton.

Enhavo de la testamento.

La testamento estas dispone je okazo de morto de la testamentinto. Li, ŝi disponas pri la persono de sia heredante. Ĝenerala kaj ĉefa celo de la testamento estas designi universale novan posedanton pri la rajtoj de la testamentinto: nomigo de heredante.

La testamentinto /la mortinto/ povas ekinkludi sian laŭlegan heredanton, ne-mige alian personon je heredante. Tiam certe povas havi ankaŭ tiu persono, kiu rajtas pri deviga parto. Sed tiun personon oni devas malkonfesi. La leĝo donas eblon ankaŭ aŭ tiu dispone por la testamentinto, ke la heredanton en iu tempo aŭ okaze de iu evento sekvu alia heredante.

Estas evidente, ke ekzistas diference inter herede kaj destinaĵo. La lasta povas esti nur havaĵa dispone. La destinaĵo estas singulara disponaĵo. La singulara dispone havas du specojn: a./ por havaĵa, kiu traktas aĵon estantan en la heredaĵo. De, ĝi estas senpera transpreno de la posedrajtoj de la aĵoj, b./ devigiteco, kies enhavo povas esti ĉu aĵo estanta en la heredaĵo, ĉu pago de iu sumo aŭ malsuldigo.

Estas speciala formo de la portestamenta havigo, la destine mem. Ĝi estas devigiteco aŭ de la heredante aŭ de la destinite.

La testamento estas jurafero. Ĝian senvalidon devas demonstri mem la rajtiginto. Je lia peto pritraktas la tribunale aŭ alia kompetenta instanco. La lasta el oficiala devo -"ex officio", ne esploras la senvaliden. La testamento estas senvalida:

a./ pro manko de portestamenta kapablo/ne-agadkapablulo faris ĝin, aŭ limite agadkapabla persono ne en formo de la publika testamento faris ĝin/.

b./ pro malkorektaĵo de la testamento /vidu pli antaŭen/.

c./ pro malkorektaĵo de la testamentanta volo kaj ĝia manifesto 1./ eraro de la testamentinto, 2./ erara supozo aŭ io poste fiaskiĝas, 3./ se la testamentinton iu per kontraŭjura minaco aŭ per malkorekta impresio inklinigis al la dispone. Kondiĉo de la senvalido de ĉiu tri kazo estas, la testamentinto cetere ĝin ne estus farinta.

d./ pro senvalido de kelkaj dispenoj enaplikitaj de la testamento /eks. 1./ en la herede, depende de iu evento aŭ limtempo, la ĝismunan heredanton sekvu alia persono, 2./ la testamentinto nomigas tiun personon al sia heredanto, kiu en momento de sia morto, ankoraŭ ne estis koncipita.

Prihereda kontrakto.

Tiu ĉi jurafero -male la testamenten ne estas unuflanka jurmanifeste. Sed la kontraktaj klientoj komune manifestas tiel, ke unu kliento, kiel testamentinto disponas, ke okaze de sia morto, havivas parton de sia havaĵo al la alia kliento. La lasta por tiu havigo, estas deviga doni iun liveron /eks. ĝismortan vivtenadon, aŭ dumvivan renton/.

Speciala formo de tiu ĉi kontrakta speco estas la donaco okaze de morto. Dum la prihereda kontrakto estas reciproka devigiteco, la donaco okaze de morto, estas senpaga. Tiu ĉi speciala donaco diferencas de la ĝenerala, donaco kontrakto, ke esenca klaŭzo de la unua estas, ke la donacito postvivu la testamentinton.

IV.

Devigita parto

La priheredan rajton de familianoj de la testamentinto protektas la leĝo,

per tio, ke ĝi garantias por ili certan kvoton el la heredaĵo ankaŭ en tiu kazo, se la testamentinto nomigas aliulon je heredanto, eĉ se li, disdenacis dum sia vivo, sian heredaĵon.

La rajtulo pro la devigita parto ricevas parton el tiuspeca havaĵo, kiun li, ŝi heredas laŭleĝe, se li, ŝi sekvas en la laŭleĝe hereda ordo.

La testamentinto povas, per malkonfeso, evikcii, de rajto de la devigita parto, la rajtulon. La kaŭzoj estas samaj, kiel ĉe la jam menciitaj motivoj de la malkonfeso. La malkonfeso estas senvalida, se ties motivon mem la testamentinto ne notis, kaj same, se la mortinto, antaŭ la farado de la testamento, pardonis la kulpinton. Krede estas senvalida la malkonfeso, se la testamentinto, post la testamentofarado, pardonis la kulpinton. En tiuj kazoj la heredanto havas rajton pri la devigita parto.

La mezuro de la devigita parto estas la duono de laŭleĝa heredoparto. La valoro de la unua, ĉiam konformiĝas al la dua. La bazo de la devigita parto estas la neta valoro de heredaĵo kaj la valoro de la donacoj fare de la testamentinto. Ne apartenas al la bazo de la devigita parto: a./ valoro de la donaco, farita pli ol dek kvin jarojn antaŭ morto de la testamentinto, b./ la valoro de tiu donaco, kiun la testamentinto havigis antaŭ la estigo de la interrilato, haviginta rajton sur la devigita parto /nature tiu ĉi regulo povas validi interne de 15 jaroj, kiel punkto a./

V.

Juraj efikoj de la priheredo

La prihereda rajto malfermiĝas -ekvalidiĝas- per morto de la testamentinto. La heredanto akiras sian parton /objekton/ sen iu manifesto aŭ sen iu jurago /heredo de "ipso jure" male la priheredan sistemon de "additio" de aliaj landoj, kie estas bezona speciala akcepta deklaro. / Per malfermiĝo ne nur la heredaĵo, sed ankaŭ la speciala destinaĵo, kune kun siaj devigitecoj transpasas al la rajtulo.

La heredanto havas rajton pri la posedo de la heredaĵo, al tiu ne necesas -aldona- aparta ago de la instanco. La heredaĵa procedo servas la aŭtentikecon, ke la heredanto persone fakte, laŭrajte pretendas la objekton de la heredaĵo. Nature, en proceso, ankaŭ la decido pri la transdono de la heredaĵo, estas renversebla.

Kiel malo de la heredo de "ipso jure" farigas la rifuzo -malakcepto- de la heredaĵo fare de la heredanto. La rifuzo celas, ke la heredanto ne obtenu al la heredaĵo, de ĉesu lia, heredanta pozicio. La rifuzo estas unuflanka jura deklaro, kiun la heredanto povas fari post la malfermiĝo de la heredaĵo. Ĝia jurefiko estas tiu, ke la rifuzanta heredanto falas el la heredo kaj la sinsekva persono estiĝas heredanto. Faro de la rifuza deklaro ne estas ligita al limtempo.

Rajton de la rifuzo havas ĉiu heredanto, escepte la ŝtaton, kiel laŭleĝan heredanton.

La rifuzo de heredaĵo ĝenerale koncernas la tuton de heredaĵo kaj ĝia parta rifuzo kun kondiĉo aŭ limdato, escepte, se la heredanto ne profesias la agrokulturon.

Se ekzistas disputo pri la persono de heredanto kaj proporcio de la heredo, tiukaze la prihereda procedo estas deviga antaŭ la publika notario.

La proprieta pretendo de la heredo neniam senvalidas. Por la disponigaj

pretendoj de la heredo, la senvalidiĝinta tempo estas kvin jaroj.

La validigo de priheredaj pretendoj okazas en la heredaĵa proceso. Estas deviga la prihereda procedo, se a./ en la heredaĵo interalie estas nemoveblaĵo, b./ la heredanto ne estas plenaĝa kaj li, si estas en nekonata loko, d./ inter la plenaĝaj heredantoj estas persono vivanta en eksterlando, e./ se la heredanto, la prihereda plenumanto aŭ la prihereda kreditoro petas ĝin.

Transdono de la heredaĵo, per la decido de publika notario, povas esti plenvalida, se: 1./ ekzistas nur unu persono, kiel pretendulo pri la heredaĵo, 2./ inter la pluraj heredantoj ne ekzistas prijura disputo en la kontraŭintereso./En tiuj ĉi du kazoj nur tiam povas okazi la transdono, se ĝi ne havas laŭlegan obstaklon./ 3./ se malgraŭ la prijura kontraŭintereso, la pretendo povas kvietige esti aranĝebla.

La heredaĵon oni devas per provizora valide transdoni, se la diskuto: a./ inter la heredantoj ekzistas, b./ ĝi estas prijura karaktero de la heredo.

La plenvalidan transdonon de la heredaĵo, post la validiĝo, oni ne povas apelacii.

Se ekzistas pluraj heredantoj, la heredaĵon ili komune posedas. La jurokomunumo de la heredantoj estas independa, ke ili heredas laŭtestamente aŭ laŭleĝe.

La testamentaj ŝuldoj parte estas de la testamentinto, parte fariĝas per la transpreno de la heredaĵo. Estante pluroj de heredantoj, ili universale respondecas al la kreditoroj, sed nur ĝis valero de siaj ricevitaĵaj heredaĵopartoj.

Terbieno estas egale heredebla, kiel alia objekto. Ankaŭ la aŭtora rajto rilatas la ĝeneralajn, priheredajn regulojn.

La hungara prihereda juro havas tiun starpunkton, ke al la heredado estas direktodona la patrolanda juro de la testamentinto.

D-ro Lajos Márton
- Hungarujo -

... o o o ...

Ĉ U V I J A M

pagis membroketizon?

A B O N U

vian revuon "Internacia Jura Revuo"

LA PROGRAMO DE UN PRI LARĜA KONIGO DE SIGNIFO DE LA
INTERNACIA JURRO.

La Asembleo dum sia 1404-a sesio la 20-an de Decembro 1965, aprobis la rezolucion No 2099/XX/, per kiu la Asembleo akceptis la programon de UN al la akcelo de instruado de la internacia juro, por ĝia studo, disvastigo kaj larĝa konigo. Konforme al tiu rezolucio la Ĝenerala Sekretario de UN estis proponita al tiuj disponoj, akorde kun UNESKO, kies celoj estas tutmonde akceli pli fundan ekkonon kaj aplikon de la internacia juro.

Konforme al la propono fare de speciala komisiono sendita per la Asembleo en 1963^{1.}/ la menciita propono havas du partojn: La unua parto enhavas la disponojn al favorigo kaj akordigo fare de la ŝtataj kaj aliaj organizaĵoj sur tereno de la internacia juro. Dum la dua parto estas koneksa kun la diversaj formoj de la direkta helpo, kiun devas UN kaj UNESKO doni al la landoj estantaj dum evoluado. La eksplikitaj proponoj, se ili estos akceptitaj per koncernaj organoj ĉefaj, inkluzive ankaŭ UNESKO -n, indikas la karakteron kaj mezuron de la programo, plue ili povas esti interesaj por tiuj, kiuj estas en rilato kun la instruado, studo kaj apliko de la internacia juro.

A./ Subteno de la programoj kaj ilia akordigo

Resumo de instruado de la internacia juro

En jaro 1966 estos publikigita la rezultoj de esploroj efektivitaj per UNESKO, pri la formado de specialistoj de la internacia juro en universitatoj kaj superaj lernejoj de la ŝtatoj de UN. La publikaĵo en angla kaj franca lingvoj, estos parto de serio "Universitata instruado de sociaj sciencoj". Informoj pri la studo de la internacia juro kaj specialaj formigoj, sur tereno de la internacia juro figuros en la juraj publikaĵoj de UN, koncerne al la studo en eksterlando.

Asisto al la almanigo de stipendioj donitaj per la ŝtatoj kaj internaciaj organizoj

UNESKO estos prizorganta, ke la ŝtatoj kaj internaciaj organizoj, kiuj agadas sur tereno de la internacia juro, almanigu stipendiojn per UNESKO: UNESKO donos informojn al la membro-ŝtatoj de UN, pri tiaj stipendioj.

Kurtigitaj kursoj ĉe centraj institucioj de UN kaj en centroj de specialigitaj institucioj

Speciala Komisiono proponis, ke oni rekomendu al ŝtatemembroj de UN, ke ili vojaĝigu, per iliaj kotizoj, en ĉiu jaro specialistojn al mallonga kurso organizita en centraj institucioj kaj centrejoj de specialigitaj institucioj, kiuj emas akcepti tiajn specialistojn. La koncernaj organoj akcelas tiajn kursojn kaj ili mem designas la kandidatojn.

Intersanĝoj de instruantoj kaj specialistoj

Speciala komisiono egale proponis ankaŭ tion, ke UNESKO invitu la ŝtatojn informi la nomojn de profesoroj kaj instruantoj, kiuj estas aktivegeblaj en la instruada laboro de aliaj landoj. La listojn de ĉi tiuj profesoroj kaj specialistoj oni povas inter la membro-ŝtatoj de UN, lanĉi.

Bibliotekoj kaj publikaĵoj de juro

Krom la subteno de laboro de la institucioj havantaj publikaĵojn de UN, por plilargigi la propagandon de la publikaĵoj, la Speciala Komisiono esprimas sian opinion, ke UNESKO turnu sin al la membro-ŝtatoj invite ilin kompili bibliografion de la juraj eldonaĵoj, krome UNESKO donu informon al la membro-ŝtatoj pri la jura literaturo de aliaj ŝtatoj. UN de sia parto ne mankas la farado al plibonigo de liverado de tiuj bibliotekoj, kiuj disponas jam pri kolektaĵo de jura literaturo. Krome ĝi klopodas sendi en jaro 1967 la liston de juraj publikaĵoj de UN al diversaj institucioj de 15 landoj kaj en jaro 1968 al 12 institucioj, kiel estas indikitaj ankaŭ en la suplemento de rezolucio No 2099/XX/.

Kooperado kun la organizoj kaj institucioj funkciantaj sur la tereno de internacia juro

Konvene al la rezolucio No 1968/XX/ de UN en jaro 1964, la Ĝenerala Sekretario, al 17 internaciaj organizoj kaj institucioj sendis liston de la juraj demandoj, pri kiuj la diversaj organoj de UN okupis sin. Ili rekomendis al tiuj ĉi organizoj kaj institucioj, ke estu senditaj al Ĝenerala Sekretario de UN, ĉiu informo kaj rimarko, kiun ili rilate la koncernajn demandojn deziras komuniki. Krome estis egale proponita ekzameni la povon al envicigo de kelkaj demandoj en siaj programoj. La respondoj de organizoj kaj institucioj estis senditaj al la dispozo de la ŝtato-membroj de UN.

Estas necese, ke la Ĝenerala Sekretario daŭrigu tiun ĉi procedon.

Organizo de konferencoj

La UN kaj la UNESKO povus kooperadi, laŭ siaj bontrovoj kun la ŝtato-membroj kaj aliaj institucioj, en organizo de la konferencoj kaj seminarioj rilate jurajn problemojn, kiuj povas esti konsidere interesaj ĉu por UN, ĉu por UNESKO.

Programo de priinstzua modelo

UNESKO estas deviga studadi la povon de ellaboro de la programo modela pri la instruado de la internacia juro, kiu enhavus por la diversaj nacioj, interesaj problemojn de la internacia juro.

Pozicio de la internacia juro en aliaj programoj de UN

Estas rekomendite, ke estu pli konsiderita la internacia juro en aliaj programoj de UN, interalie en la programo de Instituto de la Instruado kaj Esploro de UN. Simile estis sugestite, ke UN kaj UNESKO pli publiku per siaj informaj organizoj, materialon rilate la internacian juron.

B./ Direkta subteno kaj interŝanĝo

La efektivigendaj disponoj per UN kaj UNESKO, estas la jenaj:

Formado kaj perfektigo de specialistoj

Per sia rezolucio No 2099/XX/ la Asembleo decidis organizi en Afriko en jaro 1967 dummonatan regionan kurson al formado kaj perfektigo de specialistoj. Tiu ĉi kurso estos parto de serio de la kursoj, kiujn oni devas dum sinsekvaj jaroj alterne en Afriko, en Azio kaj en Latin-Ameriko organizi. Ĉi tiuj kursoj havas grandan signifon el vidpunkto de formado de junaj instruantoj, aspirantoj

kaj perfektigo de junaj funkciistoj de la ŝtata aparato de respektivaj teritorioj.

Stipendioj

Surbaze de prezento de la registaroj de dumevoluaj landoj, UN garantias la stipendiojn, en jaro 1967, 15 stipendiojn en jaro 1968 por esti ebleco al studado la funkciadon de juraj organoj de UN, respektive de aliaj organizoj internaciaj en centro de la lastaj, krome ili povu fari sciencan esploron sur tereno de la internacia juro en certaj universitatoj aŭ en sciencaj esploraj institutoj.

Ekspertizistoj

Konforme al la rezolucio 2099/XX/, UN garantias en jaro 1967, surbaze de peto de la dumevoluaj landoj, la kunlaboron de tri ekspertizistoj, ilian nombron ĝi pliiĝas al 5 en jaro 1968. Tia helpo povus atingi larĝan terenon de ellaboro de la nacia programo de instruado, de la internacia juro kaj perfektinga kurso, ĝis la konsultigo rilate la praktikan aplikon de la normoj de la internacia juro.

Ĝiokoncerna raporto de UN pri la kodifo de la internacia juro

Ĝenerale ĝiokoncerna raporto estos preparita pri kelkaj fundamentaj modeloj de la kodifo kaj pri la progesa evoluo de la internacia juro en kadro de UN.

Regionaj seminarioj

Ekde jaro 1968 oni organizos regionajn seminariojn en ĉiu dua jaro alterne en Latin-Ameriko, Afriko, kaj Azio. La karaktero de tiuj seminarioj donas eblecon por la ekspertizistoj kaj la ŝtataj funkciistoj altrangaj pridiskuti la problemojn de la internacia juro, kiuj laŭ ĝenerale aŭ laŭ regione povas esti interesaj. Krome, tiuj seminarioj faras ebla la studadon de juraj demandoj estantaj dum traktado de la organoj de UN.

La programo pri evoluigo kaj apogo de la internacia juro, kiun enhavas la rezolucio 2099/XX/, transprenas tre larĝan terenon kaj posedas, ankaŭ en venonto, signifon kaj perspektivon. Tiu ĉi programo povas enteni la establon de novaj institucioj konstatataj kaj la financan apogon al la jam ekzistantaj institucioj. Estas klare, ke la amplekso kaj la realigo de tiu ĉi eblecoj dependas de tiuj memvolaj kontribuoj, kiujn UN ricevas de siaj membro-ŝtatoj aŭ de aliaj fontoj same, en kia mezuro apogas tiun programon la juristoj de la mondo. Kiel ni jam frue menciis, la internacia komisiono adoptis en formo de rezolucio de Asembleo, la decidon pri la praktikaj disponoj al la akcelo de evoluigo de la internacia juro.

Ni devas esperi, ke tiu ĉi rezolucio entuziamigos la juristojn de la mondo kaj ili per plena apogo kontribuos al frukta, sukcesa realigo de tiuj disponoj.

Jura Departemento
de Sekretariato de UN

Noto

1./ Raporto de Speciala Komisiono pri teknika apogo al pli favora rekono, instruado, studado kaj pli larĝa disvastigo de la internacia juro. Dokumenta A/5887 de la 17-a de februaro 1965. La Speciala Komisiono ekzistis el reprezentantoj de Afganio, Belgio, Ganao, Hungarujo, Ekvadoro kaj Irlando. S-ro E.K. Dadzie /Ganao/ estis la prezidanto kaj S-ro E. Bal /Belgio/ la raportanto de la Komisiono.

LA POZICIO DE ADVOKATO EN NORVEGUJO.

Enkonduko: Juĝistaroj.

- 1/ Høyesterett: supera juĝistaro.
 - 2/ Lagmannsrett: ordinare la unua apelacia tribunalo.
 - 3/ Underretten: la unua instanco.
- Forhørsrett: por malgravaj kriminalaj kazoj.
Førliksråd: por malgravaj civilaj kazoj.

1. N o c i o.

En Norvegujo la principo estas, ke oni povas pledi aŭ mem aŭ per reprezentanto. Kiel reprezentanton oni kutime elektas juriston.

Oni distingas inter diversrangaj advokatoj: "saksførere", kiuj povas aperi nur antaŭ la unua instanco /3/, "overrettssaksførere", kiuj aperas antaŭ 2/kaj 3/, kaj fine "advokater", kiuj rajtas pledi antaŭ ĉiuj tribunaloj.

2. K v a l i f i k o j.

Estas nur unu fakultato por juristoj. La studo, kiu daŭros 4 ĝis 5 jarojn, estas tute libera, t.e. ke ne ekzistas devigaj prelegoj. Dum la studoj ne okazas iu ajn praktika ekzercado. Ĉiuj juristoj en Norvegujo havas la saman teorian edukadon.

Tuj post la fina ekzameno oni petas de la departemento por juraj aferoj kaj senpere ricevas la permeson komenci kiel "saksfører". Ne praktikinte oni nun rajtas pledi antaŭ la unua instanco.

Post du jaroj kiel "saksfører" aŭ kiel rajtigito ĉe "saksfører" aŭ juĝisto oni povas pledi antaŭ "lagmannsretten". Oni nun estas "overrettssaksfører".

Por ekhavi permeson aperi antaŭ la "Høyesterett" oni devas havi la plej bonan noton ĉe la ekzameno /laud/, esti praktikanta kiel "overrettssaksfører" de tri jaroj, kaj pasigi ekzamenon antaŭ la "Høyesterett" pledante en tri kazoj, inter kiuj du civilaj. Sukcesinte oni rajtas sin nomi "advokat".

Kiel aliajn kvalifikaĵojn ni menciis: aĝon de 21 jaroj kaj nesubkuratorecon, honorindan vivmanieron, nebankrotiĝintecon, kaj garantion de pli ol 1000 anglaĵaj pundoj.

3. R a j t o j k a j d e v o j.

a/ Civila proceso. - Oni devas havi juran reprezentanton, "advokat", antaŭ Høyesterett. Antaŭ Lagmannsrett kaj Underrett oni rajtas uzi la prokuriston de la firmo aŭ proksiman parencon, kaj antaŭ la aliaj juĝistaroj ĉiun personon, kiu estas plenaĝa kaj havas voĉdonrajton.

Oni ne povas uzi juran reprezentanton antaŭ Forlikrådet /tie sidas tri nejuristoj, kiuj povas akordigi la partiojn, sed ankaŭ diri verdikton en mal-

grandaĵoj kazoj/.

b/ Kriminala proceso. - La akuzito havas la rajton uzi defendanton en ĉiu stadio de la persekutado. Ĝenerale la akuzito devas havi defendanton dum la proceduro antaŭ la juĝistoj kaj dum la preparoj, kiam oni ekzamenas atestantojn por havigi pruvojn por la proceduro. Se li ne mem elektas defendanton, la ŝtato faras tion por li, en Oslo inter tri oficialaj defendantoj. Esceptoj; policaĵoj kazoj antaŭ Underretten aŭ antaŭ Forhørsretten, kiam la akuzito konfesas kaj deziras verdikton tie.

Ekde la momento, kiam la koncerna persono estas konsiderata kiel akuzito, li kaj sia defendanto rajtas vidi la dokumentojn kaj la juĝejan libron.

La defendanto rajtas havi tute liberan interrilaton kun la malliberulo.

Pure politikaj kazoj estas tre maloftaj. Kiom mi scias, la reguloj koncerne la defendanton estas la samaj en tiuj procesoj.

4. H o n o r a r i o j .

Grandparte la honorarioj estas fiksitaj surbaze de leĝoj, tarifoj aŭ laŭplaĉa decido de la juĝistaro.

Cetere oni estas pli libera. Nature la postulo devas esti justa. Ĝenerale la "advokato" ne postulas pli ol la "saksforer", escepte se li estas konsiderata kiel specialisto.

Se la partio ne povas pagi la kostojn, li rajtas peti la departementon por juraj aferoj pri senkosta proceduro. Se la departemento konsentas, la ŝtato pagas la kostojn.

En Oslo estas "kontoro por senkosta helpo en juraj aferoj".

En kriminalaj kazoj la akuzito ne devas pagi la kostojn, se lia enspezo estas malgranda.

5. O r g a n i z a ĵ o j .

Ekzistas nur unu organizaĵo: Den norske Saksforerforening. Ĝi estas komuna por "advokatoj" kaj "saksforeroj".

Ĝia influo kreskas. Kaj la reprezentanto kaj lia partio rajtas turni sin al la organizaĵo kaj peti decidon pri la justeco de la postulata honorario.

Grave estas, ke la organizaĵo eldonas "Norsk Retstidende" kaj "Rettens Gang", du kolektojn de juĝoj, kaj bibliografion pri norvega parto dana kaj eveda/jura literaturo.

La membreco estas libervola kaj neniel influas la rajtojn kiel "advokat" aŭ "saksforer". Kondiĉo de enskribiĝo estas, ke oni estu "advokat", "overretts-saksforer", "saksforer" aŭ rajtigita reprezentanto ĉe ili. Oni turnas sin al la loka branĉo, kiu decidas la demandojn pri membreco. Se la peto estas rifuzita, oni povas apelacii al la ĉefestraro en Oslo.

Oni povas libervole ekzigi. La templimo por ĉesavizo estas tri monatoj.

Se la ĉefestraro trovas, ke membro ne kondutas laŭ bona advokata kutimo, ĝi rajtas doni al li averton aŭ riproĉon kaj en pli gravaj kazoj monpunon ĝis $\text{N} 25$.

Se membro kondutas tiel, ke li devus ne esti membro de la organizaĵo, li povas esti eksigata post decido de la ĉefestraro per almenaŭ 5 voĉoj /el 7/. Antaŭ tio, la koncerna membro rajtas diri sian opinion, kaj la estraro de la loka branĉo devas sendi raporton. - Post propono de la estraro de la loka branĉo la ĉefestraro povas per almenaŭ 5 voĉoj ĉesigi la eksigon post tri jaroj, aŭ - se la tuta ĉefestraro samopinias - ankaŭ pli frue.

6. S o c i a p o z i c i o.

Ĝenerale la reputacio de advokato estas bona. La ekonomio ne ĉiam estas bona. La plimulto de la juristaj kandidatoj ne laboras kiel juraj reprezentantoj. La jura studo estas konsiderata kiel konvena ĝenerala edukado. Estas nun ĉirkaŭ 300 aktivaj "advokater" kaj 1200 "saksforere". Høyesterett diras verdikton en ĉirkaŭ 150 kazoj ĉiujare.

Tom Arbo Hæg
universitata bibliotekisto
-Norvegujo-

LA POZICIO DE ADVOKATO EN DANLANDO.

1. N o c i o.

En Danlando ni ne distingas inter diversaj specoj de advokatoj kiel solicitoroj, juraj konsultistoj ktp., sed ĉiuj estas nomataj "advokatoj". Ĉiuj advokatoj tamen ne havas la rajton procesi antaŭ ĉiuj tribunaloj. Per pledi antaŭ la pli altaj instancoj la kandidato devas kvalifikiĝi per speciala procesatesto.

Principe nur advokatoj povas reprezenti la partiojn antaŭ la tribunaloj. Sed same tiel, kiel oni povas ĉiam pledi sian propran aferon, oni povas reprezentiĝi pere de edz/in/o, /bo/parencoj ĝis la dua ŝtupo de la flankanta gentolinio. Ankaŭ persono, kiu estas dungita ĉe la partio, povas aperi, se li ne estas dungita ĝuste por aperi antaŭ la tribunalo.

Ni ne havas notariojn-advokatojn, ĉar la notaria afero estas tasko de la ordinara juĝisto en la diversaj distriktoj de la lando. Nur en la ĉefurbo /Kopenhago/ troviĝas speciala notario, kiu estas dungita de la ŝtato.

Kio estas dirita pri la privilegio de la advokatoj, koncernas kaj civilajn kaj kriminalajn aferojn.

2. K v a l i f i k o j.

Juraj studoj estas postulataj por ĉiuj advokatoj. Troviĝas en Danlando du universitatoj, ĉiu havanta juran fakultaton. La studoj daŭras normale 5 jarojn. Post la ekzameno oni postulas praktikadon ĉe advokato dum 3 jaroj /parte de tiu tempo povas esti funkcio kiel sekretario ĉe juĝisto aŭ alia jura oficisto/. Dum tiu tempo la kandidato devas aperi en procesoj kiel rajtigito de la advokato, sed nur antaŭ la kortumoj de la unua instanco ĉie en la lando. Post 2 jaroj estas ebleco pledi antaŭ la du pli altaj instancoj en Kopenhago kaj Viborg /Jutlando/ kun permeso de la justicministerio.

La advokato rajtas havi nur 1 rajtigiton.

Post la 3 jaroj la kandidato devas akiri oficialan rekonon kiel advokato de la justicministerio, kaj tiun li akiras, sen kromaj postuloj, se li havas 25 jarojn kaj atestojn pri bona konduto.

3. R a j t o j k a j d e v o j.

Kiel antaŭe menciite, la partio devas esti reprezentata de advokato, se li ne volas aperi sola.

En edzprocesoj la asignita partio havas advokaton, kiu estas pagata de la publika administracio, eĉ se li estas elektita de la partio mem.

En ĉiuj kriminalaj procesoj la akuzito povas elekti advokaton, se li ankaŭ pagas lin. Se li estas submetata je provizora aresto, estas devo de la juĝisto, se la akuzito tion postulas, nomi advokaton kiel lian defendanton, senpage por li. Ankaŭ ĉi tie la akuzito povas elekti lokan advokaton, sed se li konas

neniun, la juĝisto prenas iun el la grupo de advokatoj, kiu estas elektita de la justicministerio por tio. Se la akuzito tion postulas, la advokato estas nomata ankaŭ ĉe la antaŭesploro kaj povas ĉeesti la enketojn. Li havas ankaŭ liberan kontakton kun la kliento, povas viziti lin en la malliberejo sen ĉeesto de aliaj. La advokato ankaŭ havas la rajton konatigi kun la dokumentoj de la antaŭesploro kaj normale ricevas kopiojn de tiuj.

La dirita ankaŭ koncernas t.n. politikajn kazojn.

Principe la juĝado estas publika /tion, kion permesas la ĉambro, en kiu la proceso okazas/, sed oni faras esceptojn en procesoj pri seksatencoj kaj pri rilatoj de la ŝtato al aliaj ŝtatoj, kaj similaj.

En nekontraŭdiraj kazoj la advokato ne havas la monopolon reprezenti la partion. Ĉiu povas redakti bezonajn petojn kaj aperi kiel mandatulo de la partio. Tio koncernas ekz. heredajn aferojn, kie fakte ne estas demando pri proceso antaŭ la hereddivida juĝistaro.

Verajn administraciajn kortumojn ni ne havas. Kiam afero estiĝas koncerne oficistojn, ni havas oficistan kortumon, antaŭ kiu la partio povas aperi kun helpantoj, kiuj plej ofte estas advokatoj.

Konfliktoj inter la labordonanto kaj la lernanto estas pritraktataj antaŭ speciala tribunalo, antaŭ kiu la partio povas aperi kun kiu ajn mandatulo.

Koncerne negocojn pri dombestoj ekzistas speciala leĝo kun propra kortumo, en kiu agrikulturistoj sidas kune kun la loka juĝisto, kiu estas prezidanto. Ankaŭ ĉi tie la partio povas aperi kun ne-juristo-helpanto.

La samo validas por kortumoj koncerne riveretojn, akvoalton en lagoj, drenadon, heĝojn ktp.

4. H o n o r a r i o j .

Normale la honorario de la advokato fiksiĝas surbaze de la tarifoj. Sed kiam la tarifoj silentas, aŭ kiam ili donas grandan movoliberon, estas la regulo, ke la kliento pagu tion, kion la advokato postulas, kondiĉe ke tio ne estu malmodera. Tion decidas la Societo de Advokatoj, de kiu ĉiu advokato devas esti membro.

Estas permesate fari kontrakton koncerne la honorarion, se tio ne estas evidente malmodera.

Ofte la Societo de Advokatoj havas reduktitajn honorariojn fiksitajn surbaze de procentaĵo de la valoro de la postulo aŭ de la profito, precipe kiam la kazo estas facila, kvankam tion ne scias la kliento.

En procesoj la kortumo decidas pri kompenso de la kostoj, tute aŭ parte, sed ofte la kortumo trovas specialan kaŭzon por nei al la venkinta partio kompenstopostulon koncerne la kostojn kontraŭ la perdinta partio, precipe kiam la kortumo trovas, ke la problemo ne estas senduba.

Se la partio pro sia financa situacio ne povas pagi la kostojn, li havas la eblecon akiri senkoston proceson, kies kostojn do pagas la ŝtato. Tiun eblecon havas ankaŭ eksterlandano, se en ties lando danoj ĝuas samajn rajtojn kiel la enlandanoj.

Kiel io nova devas esti menciata, ke la membroj de la Societo de Advokatoj en Danlando kontribuas al aparta fonduso, kies havaĵoj estas uzataj por kompenzi perdojn suferatajn de klientoj pro falsigoj de advokato. Tiun fonduson oni establis por solidigi la publikan konfidon al la advokato.

5. O r g a n i z a ĵ o j .

Kiel jam dirite, ĉiuj advokatoj estas devige membroj de la Societo de Ad-

En Germanio oni ne imitis la anglan sistemon, laŭ kiu oni diferencigas inter la pledanta advokato /the barrister/, kiu reprezentas la klienton antaŭ la tribunalo, kaj la konsilanta advokato /the solicitor/, kiun la kliento nur konsultas. En Germanio la advokato rajtas pledi kaj konsili.

Por praktiki la advokatan profesion oni devas havi la kvalifikon por la ofico de juĝisto.

Laŭ nia Tribunala Konstitucio tiun kvalifikon oni povas akiri per du ekzamenoj:

La unua estas tiu de referendario,

la dua tiu de asesoro.

Por fari la unuan ekzamenon oni devas studi en universitato la jursciencon minimume dum ses semestroj, inter ili minimume tri semestrojn en germana universitato. Sed pro la en la lastaj jaroj enorme kreskinta studmaterialo oni regule bezonas kvar jarojn ĝis la ekzameno. Por esti allasata al la dua ekzameno la referendario devas praktike labori dum minimume tri kaj duona jaroj, maksimume dum kvar jaroj, el ili tri jarojn ĉe diversaj tribunaloj, prokuroraj oficejoj kaj ĉe notarioj kaj advokatoj, la restantan tempon ĉe administraj aŭtoritatoj kaj korporacioj. Tial la aspiranto de la juĝista kvalifiko regule faras sian ekzamenon nur kvar jarojn post la unua, do li bezonas post komenco de siaj studoj minimume ok jarojn por esti allasata labori kiel memstara advokato. Specialaj ekzamenoj por la advokateco ne estas postulataj. Estas ankaŭ ne plu necese, kiel dum la hitlera epoko, ke la aspiranto laboru dum certa tempo kiel asesoro ĉe iu advokato.

Inter la necesaj kvalifikoj por esti allasata al la advokateco estas plena voĉdonrajto, nekondamniteco, ke la aspiranto ne estas jam juĝisto aŭ salajrata ŝtata oficisto, ke li ne praktikas metion, kiu ne estas akordebla kun la prestiĝo de advokateco, kaj ke li ne kontraŭbatalas en puninda maniero la demokratian soci-ordon.

Rajtoj kaj devoj.

Por havi klaran bildon pri la rajtoj kaj devoj de la advokatoj en Germanujo oni devas scii ion pri la strukturo de la germana justico. Ni diferencigas inter ordinara kaj specialigita justico.

Al la ordinara justico apartenas la tradicie regulaj tribunaloj por la civilaj kaj kriminalaj procesoj kune kun la prizorgo de la nekontraŭdiraj kazoj, ekzemple la zorgo pri orfoj, familiaj aferoj kaj la heredaĵoj.

Al la specialigita justico ni kalkulas labortribunalojn por konfliktoj inter labordonantoj kaj laborprenantoj, la socialtribunalojn por procesoj inter la laŭleĝe asekuritaĵaj personoj kaj la publikaj asekurkorporacioj pro malsano, akcidento dum la laboro, invalideco aŭ senlaboreco, krome la impostajn tribunalojn kaj la tribunalojn de la ŝtataj administracioj.

La ĝenerala principo estas, ke ĉiu advokato rajtas reprezenti sian klienton kaj aperi por li antaŭ ĉiu tribunalo tute egale ĉu de la ordinara ĉu de la specialigita justico. Tiu regulo konas nur unu escepton, nome jenan:

Antaŭ la civilaj tribunaloj de ordinara justico, ĉe kiuj la reprezentado pere de advokato estas deviga, do antaŭ la civilaj tribunaloj de la landoj, kaj de la superaj landaj kortumoj kaj ankaŭ de la federacia kortumo. Antaŭ tiuj tribunaloj la advokato rajtas aperi aŭ reprezenti klienton nur sub la kondiĉo, ke li estas speciale allasita ĉe tiuj tribunaloj kaj regule neniu advokato estas allasita al pli ol unu kortumo. La allaso al la federacia kortumo estas precipe malfaci-

la. Ĝi estas nur ebla, se la aspiranta advokato estas proponita de speciala elekto-komisiono de la federacia kortumo. Per tio oni volas garantiĝi altan kvaliton de la allasitaj advokatoj.

Ĝenerale dirite tiu situacio garantias al la advokatoj tre vastan kampon por ilia aktiveco, ĉar ili rajtas aperi precipe antaŭ ĉiuj kriminalaj tribunaloj, tute egale pri kia instanco temas, do eĉ antaŭ la plej superaj kriminalaj tribunaloj de la Federacia Kortumo. Krome li rajtas libere reprezenti sian klientaron antaŭ ĉiu distriktjuĝisto, kiu reprezentas la plej malaltan ŝtupon de nia civila kaj kriminala justico.

P o z i c i o e n k r i m i n a l a j k a z o j :

Kiel jam dirite, la aktiveco de la germana advokato en kriminalaj kazoj ne estas limigita je certaj instancoj, tamen li ne rajtas enmiksi sin en la antaŭesplorojn fare de la polico aŭ de la prokuroro aŭ de kortumo. Legi la aktojn kaj dokumentaron li rajtas postuli principe nur, post kiam la kortumaj antaŭesploroj estas finitaj, aŭ post kiam la prokuroro estas sendinta la aktojn kun la akuzskribo al la tribunalo. Antaŭ tiu momento la prokuroro povas permesi la studadon de la aktoj nur, se tio ne endanĝerigas la celon de la antaŭesploroj.

Kun la arestita suspektito la advokato povas libere kontakti skribe aŭ persone, sed la vizitoj de la advokato povas esti kontrolataj per ĉeesto de juĝisto, se la suspektito estas arestita pro danĝero de koluzio /kunludado/ kun aliaj personoj. La juĝisto povas - ne devas - ankaŭ rifuzi skribajn informojn de la advokato al la suspektito, se la advokato malpermesas la kontrolon fare de la juĝisto. Tiu reguloj validas ankaŭ por politikaj procesoj, ĉar la germana juro ne konas imunecon por advokato.

Tiu pozicio ne estas tute kontentiga. Tial la registraro jam proponis leĝon al la Parlamento, kiu post ekvalidiĝo garantios al la suspektito la asiston de advokato jam dum la antaŭesploroj.

Se temas pri gravaj krimoj la akuzito devas havi advokaton. Se li ne povas pagi lin, la tribunalo komisiis oficiale la defendantan advokaton.

H o n o r a r i o .

La advokato en Germanujo praktikas liberan profesion. Li rajtas postuli honorarion por sia laboro kaj eĉ postuli antaŭpagon, sed nur ĝis la alto de la tarifo, kiu estas per speciala leĝo fiksita. Tamen la honorario povas ankaŭ esti fiksata per libera kontrakto pli alte ol la leĝa tarifo. Tiu kontrakto validas nur, se la kliento donas sian konsenton skribe kaj tute aparte de iu ajn alia deklaro, por eviti, ke la kliento ne povas preteratenti ĝin. La kontrakto povas ankaŭ antaŭvidi certan procentaĵon de la postulita sumo aŭ valoro de la procesobjekto. Malpermesita estas nur la t. n. sukceshonorario, kiu dependas de la demando, ĉu kaj kiomgrade la advokato gajnas la proceson por la kliento.

La ŝuldanto de la honorario estas ĉiam la kliento aŭ la komisiito, neniam la kontraŭa partio. Tamen estas regulo, ke la advokato de la gajninta partio povas enkasigi sian honorarion de la kontraŭa partio, sed de tiu li rajtas postuli la honorarion nur laŭ leĝa tarifo.

P r o f e s i a j o r g a n i z a ĵ o j :

Laŭ la leĝo pri la advokata ordo en la distrikto de ĉiu supera landa kortumo la advokataro formas Advokatan Ĉambron. La membreco estas do deviga. La ĉefaj taskoj de la Advokataj Ĉambroj kaj iliaj organoj estas:

- a/ doni konsilon al la membroj pri iliaj devoj kaj rajtoj,
- b/ peradi ĉe konfliktoj inter la membroj,
- c/ esprimi riproĉojn,
- d/ fiksi la kotizon,
- e/ zorgi pri financa helpo al advokatoj kaj iliaj postlasitaj personoj,
- f/ proponi membrojn por la honorkortumoj de la advokatoj.

La leĝo antaŭvidas certajn instancojn por la honorkortumoj kaj detale preskribas la proceduron. La honortribunaloj rajtas advokaton, kiu kulpece rompas siajn devojn, verdikte puni je aŭ admono aŭ certa monsumo ĝis alto de 10 000 germanaj markoj aŭ eksigo el la advokataro.

S o c i a p o z i c i o.

En Germanujo la advokatoj ĝuas sufiĉe grandan prestiĝon en la socio.

Nuntempe en Germanujo ni havas tro multe da advokatoj, nome inter 14 ĝis 15 000, do preskaŭ trioble pli ol ĵugistojn. Tamen ĝenerale dirite la advokata libera profesio garantias regule tiel altajn enspezojn, ke la advokato apartenas ankoraŭ al la tiel nomata "burĝa klaso", se tiu klasigo de la nuntempa socio estas ankoraŭ aktuala. Al tio venas, ke en pluraj federaciaj landoj la advokatoj estas samtempe ankaŭ notarioj. Tamen entute la vivonivelo de la advokatoj ne atingas tiun de la kuracistoj, ĉar ekzistas konsiderinda nombro de advokatoj, kies jara enspezo ne estas pli alta ol 10 000 gm., sumo, kiu garantias nur tre modestan vivon.

-D-ro V. Herrmann
ĵugisto

-Germana Fed. Respubliko-

PRI JURO EN SKANDINAVIO

I.

Skandinavaĵ juristoj studentaj en Usono verŝajne surprizigos konstantante, ke iliaj usonaj kolegoj preskaŭ ĉiam parolas pri nur du juraj sistemoj, kvazaŭ neniuj aliaj ekzistus: pri la angla-usona juro konstruita sur ĵugaj decidoj kaj pri la juro de kontinenta Eŭropo bazita sur civilaj kodoj. Tiel parolante oni forgesas, ke ja ekzistas aliaj juraj sistemoj preter la du menciitaj, ekzemple tiu de Skandinavio, kiu ĉefe baziĝas sur longdaŭra praktikado kaj popolaj kutimoj, kaj kiu estas distingebla kaj de la ĵugist-kreita juro kaj de la juro kodigita.

Interalie pro la geografia situo de Skandinavio ĝian juron ne multe influis la angla, nek la roma-civila juraj principoj. Tio estas klare videbla ne nur en la frutempaj iom primitivaj leĝokolektoj de la diversaj skandinavaĵ provincoj, sed ankaŭ en la tre evoluintaj dan-norvega kaj sveda leĝaroj de la 17a kaj 18a jarcentoj. La skandinavaĵ leĝokolektoj neniel estis ellaboritaj kodoj starigitaj sur ĝeneralaj aŭ abstraktaj juraj principoj kiel la kodoj de centra Eŭropo, sed pli ĝuste ili konsistis el aro da apartaj leĝoj kaj reguloj en diversaj sferoj de la praktika vivo. Ankaŭ hodiaŭ en Skandinavio ni ne klopodas kodigian juron en sisteman tuton, sed anstataŭe ni nur preskribas esencajn regulojn en specialaj kampoj, lasante al niaj ĵugistoj la taskon, ke ili per siaj decidoj detale evoluigu la juron de la koncerna kampo.

De la lasta duono de la pasinta jarcento tiajn leĝojn kreis en kunlaboro Danlando, Norvegio kaj Svedio, kaj de la unua mondmilito ankaŭ Finnlando kaj Is-

lando partoprenas la kunlaboron. La skandinavaĵ landoj hodiaŭ posedas identajn aŭ preskaŭidentajn leĝojn pri la sekvantaj temoj:

Kontraktoj, vendo kaj aĉeto, partopaga aĉeto, perkomisiistaj vendoj, pagpromesaj notoj, kambioj, ĉekoj, asekuro, kopirajto, patentoj, fabrikmarkoj, neplenaguloj kaj subkuratoreco, geedziĝo, separo kaj ekcedziĝo, progreso geedza, rilatoj inter gepatroj kaj infanoj, adopto kaj ŝtataneco.

La kaŭzoj, ke la verkinto decidis kompari la faradon de simplaj kontraktoj en dana kaj usona juro, estas ĉefe tiuj du: /1/ Ke la juraj reguloj de la angla-usona kaj dana sistemoj tre diferencas unu de la alia, ĉar en la du sistemoj oni eliras de malsamaj principoj por atingi la solvon de la problemoj, kiujn starigas kontraktado. /2/ Ke kontraktado donas bonan ekzemplon de unuforma juro skandinava, kaj tial la leganto povas fidi, ke reguloj, egalaj al tiuj aplikataj en Danlando rilate al kontraktado, estas aplikeblaj en Skandinavio kiel tuto.

II. DANA JURO

La danaj reguloj pri kontraktado estas troveblaj en la Leĝo pri kontraktoj de 1917, kiu bazigas sur juraj principoj pli frue evoluigitaj. En sia unua paragrafo la leĝo esprimas la gravan bazan principon, ke ofertoj kaj respondoj al ofertoj /ĉu akcepto, ĉu malakcepto/ estas devigaj rilate al la farinto. Tiu principo, laŭ kiu promesanto per sia nura promeso prenas devojn sur sin, plene kontraŭas la ĝeneralan koncepton pri kontraktado en Usono, kie devo povas esti kreita nur per la intersango de promeso kaj akcepto. La principon kompletigas § 7 de la leĝo dirante, ke ofertoj aŭ respondoj estas revokablaj de la ofertanto aŭ la respondanto nur, se la revoko atingas la alian partion - la ofertoricevanton /akceptonton/ en la okazo de ofertoj, la ofertanton en la kazo de respondoj, ĉu pozitiva, ĉu negativaj- antaŭ ol la tempo aŭ je la sama tempo, kiam tiu alia partio ekscias pri la farado de la oferto aŭ respondo. Alivorte, tiu partio povas fidi la oferton aŭ la respondon, ĉar revoko ricevita post lia ekscio pri la oferto aŭ respondo estas senefika kaj sekve ignorebla.

Tamen, ne estas necese, ke la alia partio efektive eksciu pri la revoko ricevita, ĉar se la efiko de la revoko dependus de la fakto, ĉu la alia partio vere ekscias pri ĝi aŭ ne, ja estus facile por li intence ne informigi pri la enhavo de mesaĝo ricevita tiel ĝin senefikigante, se li suspektas, ke ĝi estas revoko.

Mallonge, promeso per kiu oni metas sur sin mem devojn pri faro aŭ nefaro, ekvalidas ekde la momento, kiam la alia partio ekscias pri ĝi; sed averto per kiu oni metas sur sian kontraŭan partion devojn, /kiel ekzemple per revoko aŭ akcepto/, ekvalidas jam ekde la momento, kiam ĝi estas ricevita.

Se la ofertanto postulas akcepton de la alia partio, estas necese, ke la akcepto atingi lin antaŭ ol la fino de la tempospaco de li fiksita /§ 2/. Se la ofertanto ne fiksas tian tempodaŭron, la akcepto atingi lin antaŭ la fino de laŭrezona tempospaco. Por fiksi tian tempospacon oni devas taksii la temon kaj la komplikecon de la kontrakto farota kaj la manieron, kiun elektis la ofertanto por informi la akceptonton pri la oferto /§ 3/. La leĝo postulas nur, ke la akcepto -kiel aliaj avertoj- estu ricevita de la ofertanto sufiĉe frutempe, ne ke li eksciu pri ĝi; alie ofertanto kiu bedaŭras faritan oferton povus malebligi la kreon de la kontrakto ne informigante pri mesaĝo ricevita, kiu laŭ lia suspekto estas akcepto.

F O R U M O

La plej granda honorario

En komenco de la dua mondmilito oni kaptis varŝovian advokato-doĵenon de la pollanda advokataro S-ron Jan Nowodworski kaj portigis lin kiel kaptiton en la faman koncentrejon Oswiecim-Auschwitz. En ĝi neniu estis certa ĉu li ne iros al gasejo aŭ ne mortos per torturo, aŭ pro malsato. Sed malgraŭ sia kaptita pozicio la doĵeno, kiu jam ne povis viziti juĝejoj, dum tiu terura tempo ricevis la plej grandan honorarion, ĉar li partoprenis kiel advokato en stranga civil-proceso en la koncentrejo ... pri ora dudek dolara monero.

La proceso, en kiu ĝiuj estis kaptitoj de la koncentrejo: du kverelantoj kaj iliaj du defendantoj, la "tribunalo", kiu forĝis la ĉiutage minacantan vizion de morto, estis aranĝita laŭ la peto de kverelantoj kaj okazis post la vespera raporto, en la barako, inter duetaj dormkusejoj, dum la minaco de kruelaj konsekvencoj en la okazo de la ajn perfido.

Temis pri la eksterordinara okazintaĵo: unu el la kverelantoj ricevis el la koncentreja magazeno ŝuojn, post la mortigo de alia viktimo de la koncentrejo. La ŝuoj jam estis tro eluzitaj kaj la kverelanto, kiu ilin ekposedis, petis kolego-ŝuiston ilin ripari.

Kaj jen fariĝis mirinda okazintaĵo. Dum la riparo la ŝuisto neatendite trovis, en la kalkanumo, oran dudekdolaran moneron. La ŝuisto decidis, ke la monero, kiu en koncentreja kondiĉoj havis nenian valoron, estos lia, sed la posedanto de la ŝuoj protestis kaj ambaŭ decidis transdoni la aferon al la "tribunalo".

La doĵeno estis reprezentanto de la posedanto de ŝuoj kaj varme defendis la posedrajton de sia kliento, citis la normojn de moralo kaj etiko, sed lia kontraŭulo sin bazis sur la koncepto de "thesaurus" - la trezoro trovita - kaj fine "la tribunalo" foriris por redakti verdikton, do iris en la angulon, malantaŭen, de la dormkusejoj kaj reveninte proklamis la "Verdikton". Ĝi estis salomona. Estis decidite, ke la monero apartenas al ambaŭ kverelantoj, sed restos ĉe la posedanto, kiu, post la fino de la milito, estos devinta pagi egalvaloron de dek oraj dolaroj al la ŝuisto.

La kliento de la doĵeno estis tre kontenta kaj ĉar li estis okupita en la koncentreja kuirejo, do li pagis malavaran honorarion al doĵeno-defendanto, donante al li aldonan porcion da supo kaj tri pecojn da sukero! Tiu honorario estis, laŭ la opinio de la doĵeno, la plej granda honorario en lia advokata vivo.

Laŭ la rememoraĵoj de adv. Jan Nowodworski
raportis Roman Sakowicz
- Pollando -

L I B R O B R E T O

La verko de Akademiano Imre Szabó: La socialisma juro, estas ege utila legaĵo ne nur por la praktikaj juristoj, sed ankaŭ la ne-juristoj-interesantoj tre multon povas lerni el tiu ĉi verko. La libro estas unua hungarlingva ellaboraĵo, kiu unuece prezentas por ni la esencon kaj fundamentajn problemojn de la socialisma juro, krome responde helpas la leganton en la teoria kaj praktika

jurista laboro.

La verko dividiĝas en sep ĉapitroj, krome plua vicĉapitroj kaj paragrafoj.

Enkonduke la aŭtoro donas seriozan trarigardon pri la elformiĝo de ŝtatkaj jurteorio kaj pritraktas la diversajn diskutojn kaj kritikojn koncerne la historion de la marksista jurteorio. - La aŭtoro intense okupas sin pri la rolo de la volo en juro. Li analizas ties interrilatojn kaj konstatas, ke la klasvolo objektive estas determinita kaj tiun ĉi oni devas distingi de, la individua volo realiganta, jurregulo. Akcentas la aŭtoro, ke en socialisma juro, la socia kaj individua interesoj estas en konsento, kiun, ĉu la jurkreinto, ĉu la juraplikanto devas nepre priatenti. - Pritraktante la interrilaton de la devigo kaj memvola sekvo, la aŭtoro konstatas, ke kvankam la socialisma juro havas elementojn de la devigo, sed la memvola sekvo de socialisma juro pliigas kaj sekve ankaŭ ĝia eduka rolo kreskas. - Li akcentas, ke la jurkreado kaj la juraplikado servas la socian evoluon. Krome li prezentas, ke la reago de la juro, kiel konstruaĵo sur la ekonomia bazo estas tri direkta: a./ protektas la socian propriston de la produktiloj, b./ reguligas la distribuon de la produktaĵoj kaj la disigon de la laboro inter la membroj de la socio, c./ unu el la esencaj rimedoj de porekonomia organiza laboro de la socialisma ŝtato kaj de la administrado de ppolekonomio.

Precipe estas grava la pritraktado de la aŭtoro, pri la bazprincipo de la socialisma juro. Tiu ĉi pritraktado metas klara la interrilaton de la principoj kun la objektivaj rilatoj sociaj kaj la teza juro. La aŭtoro distingas tri specojn de la principo: a./ el socialisma socio, b./ el la socialisma ŝtato kaj c./ specife juraj principoj. - Laŭ la opinio de la aŭtoro la humanismo ne estas jura principo, ĉar ĝi mem la socialisman socion en sia tuto karakterizas. Krome ĝi sur tereno de la juro kaj precipe en la kriminala juro havas rolon. Sed laŭ mia opinio, krom la kriminala juro, ankaŭ sur ceteraj jurterenoj, precipe sur terenoj de la juroj de laboro kaj ŝtataadministrado ni povas konsideri grava la validiĝon de la humanismo.

Ankaŭ pri la legaleco, la aŭtoro detale sin okupas. Li pritraktas la konceptojn de burĝa kaj socialisma legalecoj, ilian premison. Precipe estas interesaj la pridiskutoj de la rilatoj de legaleco kaj laŭjura publika ordo, krome de legaleco kaj jurpolitiko. Pritraktante la legalecon li eksplikas, ke per la kamarada juĝado metiĝas novaj problemoj: ke ĉu oni povas konsideri la kamaradan juĝadon kiel dono de justo. - Laŭ mia opinio oni devas limigi la kamaradan juĝadon, de la dono de justo kaj tiu ĉi estas la direkto de la ĝusta evoluo en Hungarujo. Kiom la ŝtataj taskoj estiĝas kiel sociaj taskoj, tiom la kamaradeca juĝado paralele perdas sian karakteron de la dono de justo kaj fariĝas parto de la socia memadministrado.

En ĉapitro de la formoj de socialisma juro, la aŭtoro sin okupas pri la demandoj de jurtipoj kiel enhavo kaj jursistemo kiel formo. La vorton de jursistemo li uzas en du esencoj: parte kiel esprimilo de diversaj juraj formoj aperintaj en identa jurtipo kaj li distingas interne de la socialisma jurtipo la sovjetan kaj popoldemokratian jursistemojn, parte li komprenas la unuecon de jurbranĉoj.

Pritraktante la fontojn de juro, la aŭtoro konstatas tri ĝeneralajn specifecojn: a./ grava diferenco de fontoj de la socialisma juro, b./ hie-

v 24 12-23
rarkio de la fontoj de juro, c./ gravega rolo de la lego en hierarkio de la fontoj de juro. Aparte li pritraktas la rolon kaj gravecon de la kodifo. Li detale pritraktas la novajn formojn de la fonto de juro: ediktoj, laŭnormigaj decidoj kaj normigaj instrukcioj. Ĝienco de la ĉefa penso de tiu ĉi ĉapitro estas, ke la specifa formo de la fonto de juro doniĝas el la skribita juro kaj oni devas tute elimini la kutimojuron. Laŭ la aŭtoro, la apliko de la juro estas kutimojuro kaj se la apliko deflankiĝas de la skribita juro, tiam tiu ĉi situacio estas malĝusta. Nek la direktivoj -direkta principo- de plej supera kortumo estas fontoj de juro, sed ilia tasko estas donitaj al direkto de la jurisprudenco -apliko de la juro.

En la kvina ĉapitro, la aŭtoro sin okupas pri la apliko de la reguloj de socialisma juro. Ĉiokaze, li unufoje esploras la kvalitojn kaj strukturon de la juroregulo konstantinte, ke ekzistas juroregula karaktero de la fonto de juro kaj de la ne fonto de juro.

Precipe li ĝisdetaloj okupiĝas pri la klarigo de la juroregulo. Li ĝuste almontras, ke ĉiun juroregulon oni devas klarigi, sed ties valido ne dependas de ordono de la pozitiva juro. Sed la persono de la klarigo jam dependas de la pozitiva juro. La tasko de la klarigo estas la ekspliko de la objektiva enhavo de la juroregulo. Li almontras, ke la metodojn lingvan, logikan, historian kaj metotan de la klarigo de la juroregulo oni devas unuece apliki. Li rifuzas la logikan fermitecon de la juro kaj al solvo de la jurobreĉo, li rekonas la metodon de analogia legis. Sed samtempe li atentigas, ke la ĝusta, fina solvo al eliminigo de jurobreĉo estas la kreo de nova juroregulo.

Ĉe determino de la koncepto de jurapliko li akcentas, ke dum la jurapliko efektiviĝas: harmonio de la individua kaj socia interesoj, la pretendo de la direkta principo kaj legaleco.

v dat
La aŭtoro distingas tri etapojn de la jurapliko: a./ klarigo de la juroregulo, b./ konstatao kaj analizo de la kuno de faktoj, c./ decidokreo kaj konstatao de la sankcioj. Analize tiujn problemojn li akcentas, ke la unua kaj dua etapoj esence interplektiĝas, sed laŭlogike la unua paŝo estas la klarigo de juroregulo. Ĝuste li almontras, ke dum laŭregula proceduro, la kuno de faktoj konekse al objektiva vereco klarigas laŭsocie la relevantajn elementojn, kaj la objektiva vereco de la kuno de faktoj estas nur premiso de la justa decido kaj ne ĝi estas ekvivalenta. En la literaturo fakte la teoristoj ofte, la verecon de la kuno de faktoj identigas kun la justeco de la decido. Sed, ĉu fakte ne estus pli ĝuste en la unua etapo konstati la kunojn de faktoj kaj poste serĉi kaj klarigi la ĝustan juroregulon, ĉar en kontraŭa kazo povas danĝero ekzisti, ke oni la nunon de faktoj ĝustigas al la juroregulo. La aŭtoro ĝuste almontras tion, ke la juraplikado de juro ne egalas kun la aktiveco de la juĝisto, sed ĝi aperas ankaŭ sur alia kampo de jurista laboro, ekz. ŝtata-administrado.

La aŭtoro en la sesa ĉapitro detale okupas sin pri la problemoj de la jura interrilato kaj emfazas la rolon de jura interrilato, en realigo de la juro. Samtempe li konstatas, ke malgraŭ tio, la jura interrilato ne apartenas al la esencaj kriterioj de la koncepto de juro. Li distingas tri specojn de la juraj interrilatoj: a./ juraj esprimiĝoj de la materialaj rilatoj de la socio, b./ juraj esprimiĝoj de la ideologiaj rilatoj de la socio, c./ absolute juraj rilatoj. Detale okupiĝas la aŭtoro pri la demandoj de rajtoj kaj devoj, li analizas la rilaton de rajtoj kaj juraj devoj. Li okupas sin pri elementoj de

la jura interrilito, ja pri ĝis subjekto kaj objekto, krome pri juraj demandoj de la kunoj de faktoj. Ĝuste opinias la aŭtoro la sintenan, la faradon aŭ ne-faradon kiel objekto de la jura interrilito, kiu povas koncerni materian aŭ ne-materian fenomenon. Je pritraktado de la demandoj de juraj interrilitoj, ni povas vidi la ĝustan vidmanieron pri interrilito de la teorio/de juro kaj teza juro, ĉar akademiano S z a b ó en tiu ĉi verko okupas sin pri ĝenerallaj demandoj de la interrilito de juro kaj la detalproblemojn li transsendas al la fakaj jursciencoj.

En la sepa, lasta ĉapitro la aŭtoro okupiĝas pri la sistemo de la socialisma juro. Unuavice li pritraktas la kriteriojn al la dismembrigo de la sistemo de juro. Detale li konigas, ke tiun problemon povas ankaŭ pluraj jurbranĉoj reguligi kaj laŭ lia opinio la jursciencia branĉo devas kongrui kun la amplekso de la jurbranĉo. Koncerne la dismembrigon de la sistemo de juro li okupas sin pri la diskuto elformita pri la juroj de ekonomio, de jugado kaj de financo.

Unu el la meritoj de la verko estas, ke en la enhava ekspliko Ak. S z a b ó igas klara la interriliton de la teorio de juro kaj de la teza jurscienco. - La verko sur ĝenerala nivelo tiel temas la diversajn demandojn, ke la metodo donas helpon al la praktikanta juristo /jurkreinto, juraplikanto/en lia laboro, samtempe ankaŭ la kultivantoj de fakaj jursciencoj.

Por ĉiu hungara juristo mem la verko estas utila legaĵo. Ĝi helpas la laboron de ĉu praktikanta, ĉu teoria juristo kaj estas serioza rezulto de la socialisma jurisprudenco.

-/m.l. -

Redakcio: je propra nomo de la redaktoro

Budapest 502, Pf 42

Fk: Dro József Mátéffy

Fv: Magyar István

Presejo: KPM I. G.H.,

Eng.: III/400/3/179/Bp/1967, 500 pld.

Publikaj Kunvenoj de IEAJ, al kiuj estas invitataj ĉiuj membroj de la Asocio kaj kongresurbaj juristoj-neesperantistoj por pri-trakti komparjuran temon, okaze de la Universalaj Kongresoj:

Mainz /Germanujo/, 1958: Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj,

Bruxelles /Belgujo/, 1960: La pozicio de advokato en diversaj landoj,

Harrogate /Britujo/, 1961: La respondeco de la aŭtoposedantoj,

København /Danlando/, 1962: Evoluoj en la Soveta Juro /1958-1962/,

Den Haag /Nederlando/, 1964: La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj,

Budapest /Hungarujo/, 1966: La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj.